# TEJO-aktuale: numero 312, 2012-04-20

## [36-a Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA] PLI ALTA RABATO EN LA LIBROSERVO!!! 28a de aprilo 2012

*Malsukcesa elŝuto.*

### Prezidanta blogo: memorigo pri elekto de Komitatanoj B de TEJO

En la unuaj tagoj de marto komenciĝis elekto de Komitatanoj B de TEJO en kiu voĉdoni rajtas ĉiu individua membro de TEJO. Leteroj kun balotiloj kaj klarigoj kiel voĉdoni estis dissenditaj same komence de marto al tiuj, kiu havis validan membrecon por 2012. Poste leteroj estis sendataj al (re)aliĝintoj tuj post registrigo de ilia membreco. Por ke la voĉdono estu valida, la balotilo devas atingi la Centran Oficejon ĝis la 30-a de aprilo 2012; sekve en la proksima Malferma Tago estos la plej lasta ebleco voĉdoni – surloke. Legu pli: http://tejo.org/eo/node/1440

### Tutmondaj KER-ekzamenoj

La 9an de junio okazos tutmonda sesio de la KER-ekzamenoj (pri lingvo-scioj laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro). Laŭ la alvokoj 25 organizaĵoj el 13 landoj anoncis sian intencon organizi sesion en tiu tago.

Ĉu vi jam ekzameniĝis?

Kaze de sukcesa ekzameno je nivelo C1, TEJO redonas nun al siaj membroj 7,50 eŭrojn de la ekzameno-kostoj (15 € se estas kompleksa — skriba kaj parola — ekzameno). Pli da informoj pri la ekzamenoj legeblas ĉe: http://edukado.net/ekzamenoj/ker.

Se vi volas peti la subvencion de TEJO, bonvolu kontakti Petra: petra ĉe tejo punkto org.
Legu pli: http://tejo.org/eo/node/1442

### Brazila kontribuo por konkurso de filmetoj por Rio+20

Jen video farita de skipo de brazilanoj (mi aktoris) por konkurso de filmetoj por Rio+20. 3 filmoj estos elektitaj de la publiko por la finalo, kiam koalicio de pluraj NROj kaj kelkaj aktivuloj pri medioprotektado voĉdonos por elekti la venkonton, kiu parolos al ŝtatestroj. Se mi venkos, mi parolos al ili esperante.

La video ne temas nur pri esperanto, ĉar la temo de tiu konkurso estas tute alia, sed se esperantistoj amase voĉdonos por tiu video, gravuloj pliserioze traktos esperanton, do, gravas ke la esperantistaro klopodu disvastigi tiun filmeton kaj voĉdoni en ĝi.

Gravas mencii ke por voĉdoni necesas klaki sur la steleto, se oni klakas sur butono de Facebook tio ne validas kiel voĉdono, sed la plejmulto de la esperantistoj al kiuj mi petis voĉdonojn ne rimarkis tion kaj ne voĉdonis, nur ŝatis.

Amike, Rafael.
http://www.citizenglobal.com/gcca/datewithhistory/media/nvghcy?device_id=134

### LA BONNA DEKLARO NUN DOKUMENTO DE LA ĜENERALA ASEMBLEO DE UN

La fina deklaro de la Konferenco de Neregistaraj Organizoj, kiun la Departemento pri Publika Informado de Unuiĝintaj Nacioj okazigis en Bonn en septembro pasintjare, fariĝis oficiala dokumento de la Ĝenerala Asembleo de UN. Ĝi estis tradukita al ĉiuj oficialaj lingvoj de UN kaj la 20-an de marto registrita en la aktoj de la Ĝenerala Asembleo .

Pliaj informoj: Gazetaraj Komunikoj de UEA, N-ro 450, 2012-04-20, http://uea.org/dokumentoj/komunikoj/gk.php?no=450#2)

## POŜTMARKO PRI LA 125-JARIĜO DE ESPERANTO

Por omaĝi la 125-an datrevenon de la apero de la Unua Libro de Esperanto kaj por reklami la lingvon, UEA mendis ĉe la nederlanda kompanio PostNL poŝtmarkon kun la jubilea emblemo desegnita de la brita esperantisto Peter Oliver. Ĝi validas por afranki unuaklasan enlandan leteron ĝis 20gr. en Nederlando.

En marto la jubilea simbolo aperis sur poŝtmarko mendita de Esperanto-Asocio de Finnlando. La nova nederlanda marko estis eldonita sojle de la Malferma Tago de la Centra Oficejo (28 aprilo), sed ĝi estas jam aĉetebla ĉe la Libroservo de UEA, en blokoj de 10 markoj. Unu bloko kostas EUR 6,00 (plus afranko; kvanta rabato ne estas aplikebla).

La poŝtmarko pri la 125-jariĝo de Esperanto estas la kvina laŭ mendo de UEA. La antaŭaj markoj ricevis multe da publikeco en nederlandaj filatelaj revuoj, kaj la nova marko certe spertos la samon. La temoj de la unuaj du markoj, aperintaj en 2008, estis la 93-a UK en Roterdamo kaj la 100-a datreveno de la fondo de UEA. Ili ambaŭ estas jam elĉerpitaj, sed ankoraŭ haveblaj estas la poŝtmarkoj pri la 150-a datreveno de L.L. Zamenhof kaj la 100-a datreveno de Ivo Lapenna, ambaŭ eldonitaj en 2009. Ankaŭ ili estas vendataj en blokoj de 10 markoj (EUR 5,50 por bloko). (Fonto: Gazetaraj Komunikoj de UEA, N-ro 450, 2012-04-20, http://uea.org/dokumentoj/komunikoj/gk.php?no=450#1 )

## [DEJ] Fwd: Generacio 1992 ? Konkurso por 20-jaraĝaj gejunuloj

La Eŭropa Komisiono anoncas kreivan konkurson por 20-jaraĝaj gejunuloj, kies titolo estas: "Kion signifas por vi la Unueca Merkato?" La gejunuloj, kiuj naskiĝis en 1992, estas en escepta situacio, ĉar ili povas doni novan perspektivon al la evoluo de la Unueca Eŭropa Merkato. Artikolo en la blogo de Eŭropa Civitano. http://europacivitano.wordpress.com/

## Nova retejo por naturamantoj kaj ekologiemaj esperantistoj : Esperanta Naturamikaro

Kontribuoj bonvenaj en diversaj lingvoj, sed prefere en Esperanto. Rigardu: http://cms.eo-naturamikaro.webnode.nl/news/esperanto-tutmonda-multalfabete-kaj-multlingve-kiel-lingvo-inter-la-lingvoj/

## Androida ludilo - versio 1.10 kun vekhorloĝo kaj amaso da plibonigoj

Tio ĉi daŭris kelkajn monatojn, sed nun, finfine, la promesata vekhorloĝo venas! Finfine eblas vekiĝi per la muziko de viaj plej ŝatataj stacioj.!

Tio signifas ke oni povas ekz. vekiĝi per Muzaiko je la horo 6.45 matene dum la labortago kaj 10 dum la semajnfino :-)

Mi enmetis kelkajn proponojn por stacioj, iru al la menuo kaj enŝaltu ilin aŭ redaktu ilin.

Krom tio estas amaso da etaj plibonigoj, kaj ebleco subteni la programon (per donaco aŭ per reklamoj).

Dum la fino de aprilo mi testos tiun ĉu version, mi petas vin skribi se vi renkontas problemojn kun la nova versio.

En tiu ĉi versio mi devas peti por kelkaj pliaj permesoj por ke la vekhorloĝo funkciu (kaj unu por onta donaca funkcio). Espereble tio ne fortimigos homojn.

Eblas elŝuti ĝin de Guglo Play https://play.google.com/store/apps/details?id=dk.nordfalk.esperanto.radio aŭ rekta elŝuto de http://code.google.com/p/esperanto-telefono/downloads/detail?name=EsperantoRadio-release-v110.apk

Kore, Jacob

## Venontaj renkontiĝoj

37 ESPERANTO TAGOJ de BYDGOSZCZ kun 41 SESIO Internacia Akademio de la Sciencoj (AKB/AIS) dum 19–26 de aprilo 2012 okaze de 666 JAROJ de URBO BYDGOSZCZ kaj 125 – JARA JUBILEO de ESPERANTO andreo ĉe rubikon.net.pl

ĈeSKEJ en Ostrava, Ĉeĥio, aprilo 20 ĝis aprilo 22 2012 http://mladez.esperanto.cz/?p=916&lang=eo

PRINTEMPA kursa SEMAJNO: seminario Mondvojaĝantoj, intensivaj kursoj, internaciaj KER-ekzameno 13a ĝis 21a de aprilo 2012 http://gresillon.org/printempo

Edinburga Kunkongreso de Esperanto, 20a ĝis 22a de Aprilo 2012, Skotlando http://britakongreso.org/eo/

[baveleto] Trilanda renkontiĝo en Tongeren, Belgio, la 22an de aprilo 2012 http://www.tongeren.be/Toerisme (elektu vian lingvon)

Krokodila Renkontiĝo, 27-a de aprilo ĝis la 1-a de majo 2012, Arrout, suda Francio / Okcitanio http://krokodila2012.wordpress.com/ aŭ krokodila2012 ĉe gmail.com

Hispana Kongreso de Esperanto, 27a de aprilo ĝis 1a de majo, Almagro, Hispanio http://www.esperanto.es/kongreso

La 36-a Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA la 28-an de aprilo http://uea.org/dokumentoj/komunikoj/gk.php?no=447#1

Beneluksa Kongreso, de aprilo 28 ĝis majo 1, La Marlagne, Belgio http://www.esperanto-wallonie.be

JER (Junulara Esperanto-Renkontiĝo), de la 28a ĝis la 30a de aprilo, Hungario, Szeged http://www.esperanto-junularo.hu/p/jer.html

6a Translima Renkontiĝo Esperantista de la Esperanto-Grupo Essen (TRE-EGE), 5an de majo 2012 en Essen, Germanio Ludger Schmeink ludger.schmeink ĉe esperanto.de

Trejnseminario "MediaED Lab" 7-16 majo 2012 - Rigo, Bernati, Latvio http://tejo.org/eo/node/1434

75 jarojn Paco kaj Justeco, 12a de majo 2012, Brügge, Belgio heidi.en.esperantujo ĉe gmail.com

Internacia Fervojista Esperanto-Kongreso 19.05.2012 - 25.05.2012 en Herzberg am Harz - la Esperanto-urbo http://ifk64.esperanto-urbo.de

Konferenco kaj ateliero pri sociaj kaj sonvidaj komunikiloj 19a ĝis la 24 de majo 2012 - en Budapest, Hungario http://tejo.org/eo/node/1437

Komuna Dana-Germana-Pola Esperanto-Kongreso, samtempe 89a Germana Esperanto-Kongreso, de la 25a ĝis la 28a de majo 2012 (dum Pentekosto) en la urbo Berlin-Lichtenberg http://www.esperanto.de/kek2012/

Ekzotika Renkontiĝeto, 26a de majo ĝis 27a de majo 2012, en Berlin, Germanio https://www.facebook.com/events/208446285931331/

Landa kongreso de Esperanto en Saint-Aignan de Grand Lieu (apud Nantes, Francio), 25a ĝis la 29a de majo http://esperanto-france.org/congres-national-esperanto-2012

3a JRN en Brazilo, 7a ĝis la 10a de junio 2012, Pocinhos, Brazilo http://jrn-eo.blogspot.com

Junulara Semajnfino, Liverpool, Britio, 22a de junio 2012 http://www.jeb.org.uk/lpool2012eo

Internaciisma Renkontiĝo de Kataluna Esperanto-Asocio kaj Kataluna Esperanto-Junularo okazos la 29an kaj la 30an de junio kaj la 1an de julio, en Canet de Mar http://www.esperanto.cat/ir2012

NASK 2012 (25 de junio ĝis 4a de julio), Dallas, Teksaso http://esperanto.org/nask

TEATRO-STAĜO de la 7-a ĝis la 17-a de julio 2012 en Minsko, Belarusio http://www.morgaulaprintempo.eu

SOMERE ĝui en bela naturo: 13-a ĝis 21-a de julio 2012, Jünkerath, Eifel http://www.esperantoland.org/somere/

Ŝanĝo: 10a KEF en 2013! KEFeto Stafeto, 10a de julio 2012, Kopenhago, Danio http://kef10.saluton.dk/

OSIEK-konferenco kun riĉa turisma programo, 14-a ĝis la 20-a de julio, okazos en Svitavy, Ĉeĥio Petro Chrdle, chrdle ĉe kava-pech.cz

9-a kongreso de EEU 2012, 16a ĝis 20a de julio 2012, Galivo, Irlando http://eeu-kongreso.webnode.com/

"Renkontiĝo de Amikoj“ 17a-25a de julio 2012, Bajkalo, Rusio http://ra.nsk.ru/RA-7/

Somera Esperanto-Studado (SES-2012) okazos inter la 21-a kaj la 29-a de julio 2012, Nitra, Slovakio http://eo.lernu.net/pri_lernu/renkontighoj/SES/2012/

Esperanto-kastelo Greziljono: julio-21/28: Art-amatora semajno kun teatro, muziko, dancoj, kantoj, korpomovoj kaj intensaj kursoj. Informoj interrete: http://gresillon.org/s1

Hanoja UK de la 28-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto 2012 http://uea.org/dokumentoj/komunikoj/gk.php?no=413#2

2012-07-28/08-04 Greziljono: Alternativa Semajno kun verd-politika seminario de AVE http://gresillon.org/s2

Venu kun ni al Neninsulo, Hungario atendas vin! (IJS 2012), 30a de julio - 5a de aŭgusto 2012 http://www.ijs.hu/eo

Ecotopia 2012 kaj Klimat- kaj Energi-tendaro en Lausitz, Germanio: La 1-an ĝis 26-an de aŭgusto okazos Ecotopia 2012 kaj 12-an ĝis 19-an de aŭgusto okazos Klimat- kaj Energi-tendaro en Lausitz, Germanio http://ecotopia2010.org aŭ kontaktu Ronaldo N. ro-esp ĉe dds.nl

Esperanto-kastelo Greziljono: aŭgusto-04/11: Turisma kultura semajno, kursoj de franca lingvo kaj Esperanto antaŭtagmeze, ekskursoj al reĝaj kasteloj ĉe rivero Luaro posttagmeze. Informoj interrete: http://gresillon.org/s3

IJK 2012, 5a ĝis 12a de aŭgusto 2012 en Hanojo, Vjetnamio http://www.tejo.org/ijk

Esperanto-kastelo Greziljono: aŭgusto-11/20: Pupteatra festivalo por infanoj, junuloj, familioj. Farado de manpupoj kaj vesperaj spektakloj kun Christoph Frank. Muziko, gitaro, sporto, ludoj kaj E-kursoj. Informoj interrete: http://gresillon.org/s4

85-a kongreso de SAT, 11a ĝis 18a de aŭgusto 2012, Jalto, Ukrainio http://satesperanto.org/Bonvenon.html

TRE SENPAGA instruista trejnado en Sicilio (Italujo) de la 16a ĝis la 25a de aŭgusto 2012 http://edukado.net/novajhoj?id=205

FESTO 2012 | Lasta FESTO antaŭ la fino de la mondo!, 17a ĝis 24a de aŭgusto 2012, Métabief, Francio http://festo2012.esperanto-jeunes.org

79a Kongreso de Esperanto 18a ĝis 25a de aŭgusto 2012, Mazaradelvalo, Sicilujo, Italujo http://kongreso.esperanto.it/

[baveleto] 2a Esperantista Migrado Aŭtuna (EMA), 30a de septembro - 5a de oktobro 2012 http://www.esperanto.de/gea/ema2012.html

Jarfine al 29a IF, Dortmund, Germanio 27a de decembro 2012 ĝis 3a de januaro 2013 http://www.internacia-festivalo.de

4-a Junulara E-Semajno, 28a de decembro 2012 ĝis 4a de januaro 2013 Naumburg, Germanio http://www.facebook.com/junularaesemajno kaj http://www.jes.pej.pl

Pliaj renkontiĝoj haveblas en la Internacia Kalendaro: http://www.eventoj.hu